



ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX/7 - 7075. — Redaktas Dr Stanislav Kamarýt.

Karolo Pič: Esperantaj neologismoj

Prelego farita en la Somera Kolegio de Esperanto en Doksy en Julio 1949.

Problemo ne izola

Esperantaj neologismoj estas unu el la delikataj punktoj de la lingvo. Ili estas problemoj, en kies nomo jam multa inko estis elverŝita kaj pli ol unu kruda batalego estis okazinta. Malgraŭ tio la lukto ankoraŭ ne estas decidita, sed ĝi daŭras pli malpli seninterrompe ĝis la nuna tempo. Ĝi alprenas nur iom pli mildan kaj humanan karakteron ol kiam ĝi havis antaŭ unu deko aŭ dekkvino da jaroj, kiam ĉiu sincera defendanto de la lingvaj riĉeco kaj abundeco estis preta forbruligi sur ŝtiparo la unuan simpliston, kuraĝantan levi sian voĉon kontraŭ iu ajn eĉ la plej sensignifa neologismo. Kaj male, ĉiu simplisto estis kovanta same ardajn sentojn kontraŭ ĉiu reformanto, hereza perfidinto kaj stulta renversanto de la Zamenhofaj tradicioj.

Estis tempoj, kiam la neologisma demando estis demando de ekzisto aŭ malekzisto; kaj ĝiaj ideoj ofte estis konduktantaj kvazaŭ de „dura, lanta, magra aŭ saŭdado“ vere dependus ne nur la tuta venonta lingvosorto, sed eĉ ĝiaj nuraj vivo kaj ekzisto. „Ĉu esti aŭ ne esti?“, jen sonis la tiutempa krio.

Kaj simile tekstis la krio de simplistoj, kiuj estis prezentantaj la demandon same akre, necedeme kaj sovaĝe. Laŭ ili la enkonduko de predo estis tiom grava, ke ĝi mem kondukis al la lingvon al la morto.

Kaj ambaŭ partioj eluzis ĉiujn eblojn por ĝisfunde alarmi la tutan internacilingvan publikon kaj anaron. Kaj ni devas honeste konfesi, ke ili sukcesis, almenaŭ koncerne la alarmon.

Sed iom da alarmo estis utila ĉi tie. Ĝi emigis (kiel ĉiuj similaj prilingvaj alarmoj kaj kriadoj) la publikon al pli profunda kaj intensa lingvoesplorado (ni citu ĉi tie ekzemple nur la misfaman Ido-aferon, kies sekvoj estis iom similaj en tiu ĉi rilato) kaj ĝi montris pruvon al la studentoj, ke la lingvo ne estas maŝino senanima, posedanta nek problemojn nek kapricojn, kiel iuj el ili tiam eble iom kredis.

Aliflanke la okazinta bruo kreis neniel defendeblan superstiĉon, ke la demando estas tute izola, memstara kaj unika problemoj de nur la Lingvo Internacia.

Multaj sinceraj lernantoj de Esperanto, neniam aŭdintaj la vorton „neologismo“ en sia propra gepatra lingvo, ek-kredis tiam, ke ĉiuj neologismoj kaj similaj artifikoj de diablo estas afero vere pure kaj nure esperanta. Kaj ili eraris en tiu sama momento, en kiu ili faris ĉi tiun tro senpripensan juĝon kaj konkludon.

La cerboj kaj la kapoj estis tiam ankoraŭ tro arda kaj tro batalokupitaj por pli profunde esplori la problemon. Tiu ĉi pasio estu ilia senkulpigo.

Tamen nun, kiam la unua polvo de la batalego forŝoviĝis, estas eble ĵeti al la afero pli trankvilan rigardon science esploran kaj kritikan.

Se oni faros tion, oni facile malkovros, ke la problemoj estas neniel hazarde aŭ izole. Antaŭ ĉio oni almenaŭ konvinkigos pri tio, ke ĝi ne estas ekskluziva propraĵo de

Esperanto, trovanta analogion nenie aliloke, sed komuna fenomeno pli malpli propra al ĉiuj lingvoj vivantaj, aplikataj literaturo kaj parole.

Siatempo ekzistis scienculoj sincere supozantaj, ke ĉiuj fenomenoj de Esperanto estas io monstra, nenatura kaj ĉiuflanke senanalogia. Tiaj supozoj feliĉe fariĝis jam eksmodaj.

Ĉar dume, baze de multaj kaj profundaj studoj klare montriĝis, ke ĉiuj lingvaj okazaĵoj observeblaj en Esperanto estas same konstateblaj ankaŭ en lingvoj tiel dire vivantaj; se ne en ilia evolua stato nuntempa, tamen almenaŭ en iu el iliaj pli fruaj evoluoperiodoj.

Nenio en Esperanto ŝvebas enaere. Ĉiuj fenomenoj kaj leĝoj de la Lingvo konvinke parolas tion. Ankaŭ esperantaj neologismoj pravas tion elokvente kaj palpeble.

Sed — ni iomete rigardu la historion!

Novaj vortoj enfluas

La neologisma problemoj estas nenia novaĵo en la Internacia Idiomo. Ĝi ekzistis en ĝi jam de post la unuaj tagoj de Esperanto. Sed la diferenco inter la estinta kaj la estanta periodoj de la Lingvo ne estas en la komenca neekzistado kaj pli posta ekzistado de la problemoj, kiel iuj opinias, sed simple nur en la nuda fakto, ke en la unuaj jaroj de Esperanto tiu problemoj tute ne estis problemego.

Laŭ konata leĝo, valida senescepte por ĉiuj idiomoj kaj langaĵoj, en ĉiun vivantan lingvon konstante enfluas novaj vortoj kaj esprimoj, kiuj iom post iom maljuniĝas, iĝas eksmodaj kaj netaŭgaj, kaj fine, kiam la lingvo ilin jam plene eluzis kaj elŝucis, tute ĝin forlasas, forfluante el ĝi.

Laŭ ĉi tiu leĝo ankaŭ en Esperanton en ĝiaj unuaj ekzistajaroj penetris multaj novaj radikoj, kiuj ĝis tiam estis tute nekonataj al ĝiaj parolantoj.

La penetrado estis okazanta laŭ sufiĉe konsiderinda amplekso, ĉar la bezonoj kaj necesoj de la ĵus maskita juna idiomo estis tiam memkompreneble iom pli grandaj kaj urĝaj ol la bezonoj de la nuntempa matura Esperanto, kiu jam pli malpli sufiĉe posedas taŭgajn terminojn por preskaŭ ĉio.

Sed malgraŭ tio, ke en la unuaj jaroj novaj vortoj senĉese venadis en la lingvon, neniu esperantisto batalis aŭ militis kontraŭ ilia iompostioma enflado. Ĉar en la unua periodo de Esperanto, kiam Zamenhof ankoraŭ estis vivanta, li mem saĝe kontrolis kaj gvidis tiun enfladon tiel, ke ĝi neniam iĝis nenatura, tro rapida aŭ abrupta. Per sia lerta mano li sciis direkti ĉion tiamaniere, ke neniam en la fruaj lingvojaroj la afero iĝis demando aŭ problemoj, malgraŭ tio, ke krom la radikoj entenataj en la Universala Vortaro de la Fundamento kaj flanke de ili li mem enkondukis kaj alprenis en la lingvon ankoraŭ pluajn preskaŭ du mil vortojn, kiujn poste Wüster kolektis kaj registris en la tiel nomata Zamenhofa Radikaro, kiu ĝis nun ankoraŭ ne estas oficialigita.

Ĝis tiam do la tuta afero marŝis tute normalan kaj naturan vojon. Urĝa kaj pendanta problemo ĝi iĝis nur pli poste, jam post la morto de Zamenhof, kiam precipe la Budapeŝta literatura skolo komencis ŝuti en la lingvon dekojn kaj centojn da tute novaj, ĝis tiam nekonataj radikoj kaj terminoj.

Kaj ĝuste tiam la milito eksplodegis.

Dum la enfluo de novaj vortoj estis okazanta nature kaj laŭ la ekzistantaj lingvoleĝoj, la esperantista publiko ne dediĉis al ĝi troan atenton, ĉar la iompostiomman, tute naturan kaj senĝenan, enfludon de necesaj radikoj ĝi preskaŭ eĉ ne malkovris kaj rimarkis. Sed en tiu momento, en kiu la ĝis tiam tute natura tajdo iĝis organizita inundo kaj importado, forta ondo de akra kontraŭstaro traskuis la tutan esperante parolantan legantaron.

Kaj de post tiu momento la neologisma demando ne plu staras kiel natura lingvofenomeno, sed kiel prema kaj akre delikata lingvoproblemo, malgraŭ tio, ke ĝi en si mem fakte estas tute senproblema.

La enfluo de novaj vortoj ne estas demandego, se ĝi estas nur enfluo. Sed ĝi facile povus iĝi demandego, se la natura enfluo fariĝus nenatura kaj organizita trudado kaj importado. La natura flanko de la afero eĉ nun staras ekster ĉiaj dubo kaj diskuto. Verdire la tuta afero staras kaj eĉ ĉiam staris ekster ĉiaj dubo kaj diskuto. Ĉar la vortenfluo ne estas diskutinda. Kritikenda tamen estas la amplekso kaj mezuro, laŭ kiuj tiu importado estas okazanta. Kaj estas necese konfesi, ke en certaj antaŭmilitaj jaroj tiu amplekso superis ĉiujn honestajn limojn kaj mezurojn.

Pri la neologismoj la afero do staras evidente tute same kiel pri multaj kaj multegaj aliaj aĵoj kaj aferoj. Ĝi estas tute normala kaj natura. Ankaŭ detempaltempa pluvo estas natura kaj normala kondiĉe, ke ĝi ne iĝas biblia antaŭdiluva, seninterrompa kaj monataŭra pluvego kaj torento. Ĉar tiam ĝi ĉesus esti utila kaj benplena kaj ĝi fariĝus malbenata kiel ĉiuj kataklismoj, malbonaj katastrofoj kaj nenaturaj plagoj.

Neologismoj — arkaismoj

La neologisma problemo estas interesa ankoraŭ laŭ alia historia flanko.

Por multa nuntempa esperantisto estus instrue foliumi en malnovaj libroj kaj revuoj esperantaj el antaŭ longe forpasintaj tempoj. Li trovus tie multon, kio nun estas prezentata kiel la plej nova kaj freŝega lingvoakiraĵo, kaj kio fakte estas nur tre malnova fosilio.

En malnovaj jarkolektoj de Gazeto de bohemiaj esperantistoj el 1909—1914 oni povas legi koliero (kolĉeno), klaviero (speco de fortepiano), akcidento, atrapi (kapti dumage), briske (malnova formo de bruske), inundo, jubeli (anstataŭ la nuntempa jubili), labila (malfirma, necerta), mapo (geografia karto), persvadi (konvinki, decidigi), toro (anstataŭ la nuna taŭro) ktp.

Interalie oni povus trovi tie ankaŭ la neologismon trista (malĝaja, malĝoja), kiu estas multflanke interesa. La vorto per si mem memkompreneble ne estas iel eksterordinare admirinda. Ĝia latina deveno (tristis) estas nenio fremda en Esperanto. La Lingvo Internacia posedas milojn da similaj latindevenajoj. Tamen la vivoĵo de trista en Esperanto estas iom nekutima kaj eksterordinara. Nuntempe ĝi estas plu eble precize difini en kiu jaro kaj en kiu verko ĝi aperis la unuan fojon. Sed jam en 1907 ĝi troviĝas en la Vortaro de Kabe, kie ĝi estas registrita. Oni do rajtas supozi, ke ĝi vivas en la Lingvo Internacia almenaŭ de post 1900.

Tial oni ne povas deteni sin de miro, se post la pli ol tridekjara ekzistado de tiu vorto oni legas en Lingvo Stilo Formo de Kalocsay (aperinta en Budapeŝto en 1931) en lia ĉapitro pri „La evoluo de nia poezia lingvo“ jenan alineon:

„Tiuj tendencoj (neologismemaj) daŭras en la lingvo, kaj aperas stumbli anstataŭ falpuŝigi, langvoro anstataŭ animmalstreĉiĝo, nupto anstataŭ geiĝo, svelta anstataŭ gracitalia, rara anstataŭ malofta, aŭdaca anstataŭ riskemega, eĉ, lastatempe, trista anstataŭ malĝoja.“

Kaj oni komencas ne kompreni la aferon vidante, ke s-ro Kalocsay provas en sia Parnasa Gvidlibro enkonduki

tiun ĉi prahistorian arkaismon kiel la plej freŝan „novan vorton“, kaj aŭdante, ke li deklaris ĝin „lastatempe aperinta“.

Memkompreneble oni povus simile esplori unu neologismon post la alia kaj serĉi ĝiajn aĝon, devenon kaj vivlongecon. Verŝajne oni baldaŭ malkovrus, ke pluraj tiel nomataj „neologismoj“ grandparte estas nur „arkaismoj“, el kiuj multaj vivas en la Lingvo jam preskaŭ de post 1887.

El la supre menciitaj „novaj vortoj“ du (akcidento kaj inundo) estas oficialaj, du (mapo kaj persvadi) estas registritaj en Plena Vortaro de SAT. kaj unu (koliero) troviĝas en Parnasa Gvidlibro. La ceteraj ses (toro, klaviero, atrapi, briske, jubeli kaj labila) troviĝas en neniu oficiala aŭ ducnoficiala vortaro, kaj estas sporade troveblaj nur jen kaj jen en la literaturo aŭ en kelkaj nacilingvaj Esperantovortaroj, kies vortprovizo ne estis tro zorge kontrolita kaj en kiujn tial manke de la necesa materialkribrado enŝoviĝis multaj arkaismoj, neoficialaĵoj kaj lingvaj fosilioj.

Tamen eĉ el la ses laste nomitaj formortintoj ankoraŭ du (briske kaj jubeli) saviĝis kaj nun feliĉe daŭrigas sian vivon en Parnasa Gvidlibro sub iom ŝanĝita kaj aliĝita formo (bruske kaj jubili).

Sed ĉiuj ĉi, ĉu la oficialaj, ĉu la duonoficialaj aŭ tute neoficialaj supre cititaj vortoj vivas en la Lingvo jam de post 1900. La fakto, ke post la kvindekjara ekzistado nur kvar el ili iom pli ĝenerale enradikiĝis, akirante iom pli vastan uzadon, pruvas, ke la neologisma problemo malgraŭ ĉiu bruo kaj kriado ne estas tiel danĝera al la Lingvo, kiel tion volis kredigi la fanatikaj defendantoj de la Zamenhofaj tradicioj.

La esperanta publiko estas tre konservativa. Ĝi ŝatas neniam eksperimentojn aŭ provaĵojn. Rilate al la Lingvo ĝi ne kondutas kiel rilate al la vestoj. Ĝi ne ŝatas la plej freŝajn modojn. Kaj ĝuste tiu ĉi ĝia konservativemo ŝirmas la idiomon kontraŭ ĉiuj senpripensaj ekscesoj de tro avangardaj literaturistoj kaj poetoj. Ĉar finfine la Lingvo ne estas karnavala robo, kiun oni povas ŝanĝi trifoje dum vespero.

Krome multaj neologismoj, ĉerpitaj grandparte el la malpli konataj trezoroj de eŭropaj lingvoj, ne estas tiom internaciaj kiel la cetera lingva materialo de Esperanto, kaj sekve de tio ili ne firme sidas en la memoro kiel iliaj malpli modernaj kaj malpli junaj antaŭuloj. Ne ĉiuj esperantistoj posedas ekzemple la antikvan grekan lingvon. Kaj por tiu ĉi plimulto ne konanta ĝin estas multe pli facile memori kaj diri malgranda anstataŭ mikra, malgraŭ tio ke mikra aperas jen kun simila, ĉu kun iom modifita signifo ankaŭ en kelkaj radikoj sciencolingvaj kiel mikrobiologio, mikrobo, mikrofarado, mikrofono, mikrometro, mikroskopo kaj aliaj. Same estas multe pli facile diri kanibalo anstataŭ antropofago, kiu lasta estas netaŭga ne nur pro sia deveno el la malnovgreka lingvo, kies konateco ege malgrandiĝis eĉ ĉe la klerulo, sed ankaŭ pro sia relativa longeco. La principo de neceso kaj sufiĉo ne validas nur en la vortformado. Iam ĝi efikas ankaŭ ĉe la vortelekto. Krome ne ĉiu vorto bezonas sinonimojn. Nur tre ofte uzataj vortoj ne povas vivi sen ili. Tial, parolante ekzemple pri knabino, vi certe ne kontentiĝos per bela, dirante „kia bela junulino“, sed vi eĉ aldonos „kia ĉarma kaj rava junulino“. Ĉar vi tro ofte emas paroli pri virinoj kaj vi ne volas ŝajni teda, uzante nur unu solan adjektivon bela. Sed kanibalo vole nevole estas tiel seka temo, traktata eble nur en sciencaj lernolibroj aŭ maksimume ankoraŭ en kelkaj pirataj aventurromanoj malnovtempaj, ke versimile neniam vi sentos bezonon gradigi viajn sentojn pri kanibalo per la aldonado de ĝia neologisma sinonimo antropofago. Cetere eĉ se vi eksentus tiun bezonon (ekstreme neverŝajnan), vi povus servi al vi tiukaze per hommanĝanto, kiu estas same longa kaj kiu plie estas kreita eĉ nur el la oficiala lingvomaterialo.

Samkaŭze ne ĝeneraliĝis siatempe ekzemple veterinaro, kiu en la lukto kiu okazis malvenkis kontraŭ la propra kunmetita bestokuracisto, kiu por klera necesantisto eble unuavide ne estas tiel facile divenebla kiel veterinaro, sed kiu estas pli oportuna, pli komprenebla kaj pli facile memorebla por la pli multa parto

de la simpla esperantistaro, kiu komprenas ĝin eĉ senlerne. Tamen ne ĉiu esperantisto komprenas senlerne veterinaro, kiu por tre multaj homoj estas pli malpli tute fremda vorto malgraŭ tio, ke ĝi estas tute laŭleĝa kaj oficiala.

Ĉar finfine pri la sorto de ĉiu neologismo ne decidas la aŭtoro, kiu ĝin enkondukis, nek la aŭtoroj, kiuj ĝin poste propagandas kaj uzadas, sed unuavice ĝiaj bezonateco kaj neceseco. Nebezona kaj neceso neologismo elvaporigos el la lingvo same rapide, kiel ĝi penetris en ĝin. De la morto ne savos ĝin eĉ la aŭtoritato de ĝia enkondukinto.

Kontraŭe vorto necesa kaj jam longe bezonata enradikiĝos eĉ malgraŭ bruaj kaj fanfaraj protestoj de multaj malamikoj. Tiel ĝeneraligis en la lingvo ekzemple ŝrumpi, treti, gregi, ŝablono, mucida, strikta kaj aliaj, kiujn enkondukis ankoraŭ Zamenhof mem.

Aliflanke estas dubinde ĉu iam familiariĝos en la lingvo vortoj kiel tepida (varmeta), trepidi (forte skutremi), sordida (tre malpura), kiuj senescepte estas pli malpli neinternaciaj latinaĵoj, kies senco estas tre facile interpretebla per propraj kaj samlongaj vortoj pure esperantaj. Krome eĉ en la „alta literaturo“ ĝis nun ili estas nur tre malofte renkonteblaj, same kiel temerara (blinde kuraĝa, trorisema), kiu estas neceso pro la ekzisto de ne nur unu sed eĉ du similsignifaj aŭ samsignifaj radikvortoj kuraĝa kaj aŭdaca, kies senco oni plie povas laŭvole grandigadi aŭ malgrandigadi per la aldono de la respektivaj sufiksoj eg' aŭ et'.

Same sporade uzataj restis taverno (drinkejo), omeno (malbona antaŭsigno), poltrona (malkuraĝa), morbo (malsano), maligna (malica), kulmo (kulmino) kaj aliaj, malgraŭ tio, ke ili estas registritaj en la Parnasa Gvidlibro.

Ja eĉ ŝajnas, ke simila sorto trafos multajn aliajn „parnasgvidlibraĵojn“, se ne ĉiujn, certe almenaŭ tiujn, kiuj ne estis ĉerpitaj el la literaturo kaj vortaroj, sed kiuj estis kreitaj speciale nur por la Parnasa Gvidlibro; ĉar tiuj vortoj ne estas vivantaj, sed nuraj teoriaĵoj. Kaj ĉiuj teoriaĵoj, eĉ la plej brilaj, kutime ĉiam senevite mortas. Ĉar en Esperanto ĝenerale vivas nur tio, kion la vivo alportis. Ĉio cetera perdiĝas kaj formortas. Eĉ ĉi tie manifestiĝas la mistera vivanteo de la Lingvo, kiu elsakas el si ĉion, kion ĝi konsideras fremda, neutila kaj nebona.

La longeco de kunmetitaj vortoj

Unu el la kutimaj apologioj neologismaj estas la neniel pruvita aserto, ke la kunmetitaj vortoj ĝenerale estas tro longaj kaj multpezaj por la literaturo. Kaj oni argumente pravas, ke sekve de tio estas necese anstataŭigi ilin per tute novaj formoj pli koncizaj kaj pli mallongaj. Tiu ĉi postulo cetere ne estas principe malbona kaj damnda. Ju pli mallonga iu vorto estas, des pli urĝe kaj insiste ĝi efikas. Sed ni iom pli detale esploru, kiel staras la afero.

En Parnasa Gvidlibro troviĝas aro da neologismoj, kiuj estas pli longaj aŭ, bonokaze, almenaŭ same longaj kiel iliaj samsencaj fratoj oficialaj. Ni registru ĉi tie kelkajn tiajn vortojn: acerba (amara, acida), adolta (matura), adversa (kontraŭa), anakoreto (ermito), antropofago (kanibalo), botono (burĝono), cirkonspekta (singarda) ktp. Memkompreneble ĉi tiaj vortoj estas ankoraŭ pli multaj, sed ne estas necese citi ĉiujn ĉi tie. Pri antropofago ni jam parolis supre. Cetere tio, kion ni diris pri antropofago, validas preskaŭ senŝanĝe pri anakoreto. Ankaŭ anakoreto estas unuavide ne deĉifrebla malnovgrekaĵo, fremda al ĉiu nekono de la klasikaj lingvoj. Krome ĝi fortimigas per sia longeco. Kaj kiel antropofago ankaŭ anakoreto prezentas ideon tiom unikan kaj maloftan, ke ne estas eble supozi, ke la lingvo iam praktike bezonus krom la jam enradikiĝinta, trafa, mallonga kaj elasta ermito ankoraŭ la pezan neologisman sinonimon anakoreto.

Same acerba ŝajnas al ni tute superflua. Ĝi prezentas nenian novan ideon aŭ nuancon, kaj finfine ĉiu parolanto aŭ leganto preferas la jam elprovitajn kaj familiarajn amara, acida kaj similajn.

Adversa, botono rekte estas lingvaj superfluaĵoj. Ankaŭ cirkonspekta estas apenaŭ pravigebla. Kaj oni nur pene kaj malfacile povas imagi, ke iu uzus ĉi

tiujn vortojn prefere ol la malnovajn kontraŭa, burĝono kaj singarda.

Kaj ili ĉiuj kune refutas unu el la plej gravaj pretendoj neologismemaj. Ili ne estas pli koncizaj, pli mallongaj kaj pli trafaj ol la samsencaj vortoj jam ekzistantaj. Male, kelkaj el ili estas ture longeĝaj, pezaj, malelastaj kaj malviglaj. Ekzemple anakoreto, cirkonspekta, antropofago estas almenaŭ nebelaj, se ni ne volas diri monstraj.

Oni ne forgesu, ke ankaŭ en la lingvoj regas kaj estas konstatebla certa ekonomio, kiu igas la lingvojn apliki el du samsencaj formoj tiujn, kiuj estas pli koncizaj kaj pli elastaj. Kaj tiu ĉi ekonomio regas en Esperanto tute same kiel en ĉiu ajn lingvo natura. Se el du samsencaj formoj la neologisma estas pli longa kaj pli malvigla, ĝi malvenkas la batalon. Se dum la komparo la oficiala kaj ĝis nun ekzistanta formo montriĝos tia, tiam ĝi malvenkos la batalon kaj transdonos sian pozicion al vorto nova, pli taŭga kaj elasta.

Tiel siatempo profundegaĵo cedis sian lokon al abismo, florplektaĵo cedis al festono, korpemiteco al angoro, malsovaĝa al milda ktp. Tamen ĉe humida, aperti, noci kaj neglekta lingvo ankoraŭ hezitas, kaj ŝajnas, ke ĝis nun tenas la batalon la malnovaj, eĉ se kelkiam pli longaj formoj malseka, malfermi, malutili kaj malzorgi, kiuj estas por la plej vasta esperante parolanta publiko pli kompreneblaj ol la ĵus cititaj formoj novaj.

Sed ekzistas eĉ tiaj vortduopoj kiel ferio — libertempo, giganto — gravegulo, kalva — senhara, karambolo — kunpuŝiĝo, aŭroro — tagiĝo, stulta — malsprita, aflikti — malĝojigi, disipi — malŝpari, fora — malproksima ktp., el kiuj konserviĝis ambaŭ paruloj, ĉar parte ili ne estas tute samsignifaj, esprimante certajn nuancojn kolorajn, parte ili montriĝis taŭgaj sinonimoj kaj sekve de tio la Lingvo retenis ilin ambaŭ por tiel pliriĉigi.

Ankaŭ ĉi tio pravas, ke la Lingvo ne estas io senanima kaj senviva, sed male, ke ĝi rekte similas al la Naturo mem. Oni facile povus kompari Esperanton al vasta herbejo flororiĉa. Ankaŭ tie unuopaj herboj, floroj, vegetaĵoj kaj herbaĵoj nerimarkate luktas, interbatalas kaj konkuras. Jen venkas tiu ĉi, jen la alia. Iam iu venkita mortas kaj foriĝas. Alitempe ambaŭ retenas sin kaj kune daŭrigas la vivadon.

La ĉiama vortlukto de Esperanto ne estas io nenatura, eĉ se ĉiuj detaloj de tiu lukto ne ĉiam estas tute klare registreblaj. Tiu lukto pravas, ke la Lingvo vivas. Ne estas necese maltrankviliĝadi pri ĝi. Ĉar tiu konstanta batalo neniel povas endanĝerigi la Lingvon. La interna, ofte nevidebla kaj nerimarkata batalo okazanta sur herbejo ne endanĝerigas la herbejon. Same ĝi ne malutilas al la Lingvo. Nur estas necese sekvi ankaŭ ĉi tie la Zamenhofajn tradiciojn kaj lasi liberan marŝadon al la evoluo. La Naturo neniam detruas sin mem, ĉar ĝi ĉiam scias trovi elirejon el ĉio. Ankaŭ sur la lingva kampo la Naturo scias trovi elirejon el ĉio. Nur estas necese ne malhelpi kaj obstakli ĝin per nenaturaj, perfortaj kaj nelertaj intervenoj, korektado kaj reformoj, kiuj preskaŭ ĉiam pli multe malutilas ol utilas, ĉar ĝis nun preskaŭ senescepte la Naturo ĉiam montriĝas pli saĝa, pli sprita kaj pli informita ol ni, la korektantoj.

Vortoj sen elvoka forto

Simile senenhava apologio neologisma estas la aserto, ke kunmetitaj vortoj kutime ne posedas la saman elvokan forton, kiun posedas la radikvortoj neologismaj.

Kalocsay kaj aliaj aŭtoroj plurloke eĉ kolektis riĉan materialon por dokumenti tion. Tamen ŝajnas al ni, ke eĉ tiu ĉi aserto estas nur parte prava kaj nepre ne tiel valida, kiel oni ĝin deklaras.

En sia prelego pri „La perspektivoj de la Esperanta literaturo“, farita dum la XXVIII-a Universala Kongreso de Esperanto en Vieno en 1936 Kalocsay interalie provis montri, ke kunmetitaj vortoj estas tro klarigaj, tro sekaj, ĉirkaŭvoĵaj kaj barbaraj por povu konkuri kun nuraj radikvortoj. Li elektis eĉ tre trafan ekzemplon, en kiu oni insultas iun, dirante al li, ke li estas porko, kiu ne emas laboregi. La econ de tiu homo oni povas en Esperanto

proksimume esprimi per la vorto maldiligenta. Kaj nun Kalocsay klarigas, ke ĉi tiu maldiligenta kun sia klariga, afera, indiferenta karaktero neniel estas taŭga. Ankaŭ mallaborema, malagema, malvigla kaj aliaj ne estas laŭ li kontentigaj kaj ne taŭgas. Kaj li plejdas por la neologisma adjektivo pigra, asertante, ke pigra porko estas almenaŭ grasa, fortega kaj impresa insultaĵo kaj esprimo.

Eble pigra porko vere estas esprimo ne netaŭga. Tamen maldiligenta porko ne estas malpli akra. Ĝi posedas la saman elvokan forton kiel pigra porko.

Cetere ĉio ĉi estas antaŭ ĉio afero de kutimo, afero tro individua, kiun oni ne povas definitive solvi kaj prijuĝi. La tuta neologisma demando estas grandparte demando de kutimo. Se en Esperanto ekzistus ia vivanta lingvorutino, la tuta neologisma problemo sendube irus al diablo.

Laŭ faritaj spertoj multaj lingvostudentoj, renkontintaj unuafoje la kunmetitan vorton flugmaŝino abomenis ĝin. Ili konsideris ĝin kruda kaj barbara unikaĵo de la Lingvo Internacia kaj ili estis pretaj rompi la lancon por la neologisma aviono, kiu ŝajnis al ili pli eleganta kaj belsona ol la primitiva kaj barbara flugmaŝino. Tamen, kiam ili hazarde eksciis, ke en la angla lingvo la sama aparato estas nomata tute analogie flying machine, ili subite forgesis sian komencan abomenon. Kaj ni jam vidis tiajn studentojn, kiuj, farinte ĉi tiun sperton, por ĉiam forĵetis la neologisman aviono, alpreninte la familieran flugmaŝino.

Same pri flughaveno kaj aerodromo. Unuavide ankaŭ aerodromo eble aspektas iom pli ekzotike kaj kolore ol la kunmetita flughaveno. Sed post ioma uzado la rolo renversiĝas. La batalon fine venkas la propra flughaveno kontraŭ la fremda kaj importita aerodromo.

Esperanto estas lingvo tro juna, kaj tiuj, kiuj volas riĉigadi ĝin per amasa enkondukado de diversaj neologismoj, provas, ke ili ne nur ne penetris en la spirito de Esperanto, sed eĉ ke ili ne penetris en la spirito de iu ajn homa lingvo entute, la gepatran ne esceptante.

Tro ofte la tiel nomataj radikvortoj, kiujn oni enkondukas, tute ne estas radikvortoj, sed en siaj lingvoj ili estas same derivitaj kaj kunmetitaj kiel ekzemple la esperantaj maldiligenta aŭ flugmaŝino. Por konvin-

kiĝi pri tio sufiĉas konsulti iun ajn historian gramatikon de la respektiva lingvo.

La sola diferenco inter tiuj ĉi „radikoj“ kaj la esperantaj „kunmetitaĵoj“ ne estas en ilia „radikeco“ unuflanke kaj „kunmetiteco“ aliflanke, sed sole en iliaj maljuneco aŭ juneco. La francdevenaj aŭ latindevenaj „radikoj“ estas relative tro maljunaj. Ili estis kunmetitaj antaŭ tiom da jarcentoj, ke ĝis nun oni tute forgesis ilian kunmetitecon. La esperantaj kunmetitaj vortoj kontraŭe estas ankoraŭ tro junaj kaj tro malmulte eluzitaj, por ke oni povu konsideri ilin unublokaj.

Kiam maldiligenta estos uzata dum tiom da jarcentoj kiel la latina piger, -a, -um, ĝi iĝos same radika kiel ekzemple la franca malheureux, kiun la francoj uzas kiel radikvorton, jam tute ne pensante pri la malo de „heureux“.

Antaŭ pli ol unu jarmilo, kiam la naciaj lingvoj de Eŭropo komencis naskiĝadi, certe al obstinaj latinistoj tiutempaj multaj vortoj kaj esprimoj de la tiam estiĝanta franca aŭ ĉeĥa lingvo ŝajnis nebelaj, senkoloraj, sekaj kaj sen ĉia ajn eĉ la plej eta esprima kaj elvoka forto. Ilia ŝajno tamen ne detruis la tiutempajn ĵusnaskitojn. Ili postvivis siajn misprofetojn kaj ili diskreskas eĉ nun, kiam la tiamaj misaŭgurintoj jam de longe putras forgesite en siaj forgesitaj tomboj. Kaj ĝuste la formoj de ili plej akre kritikataj servas eĉ nun kaj estas plenaj de elvoka forto, koloraj rememoroj kaj riĉaj asocioj.

Se la tiamaj poetoj kaj verkistoj ĉu anonimaj ĉu konataj estus agintaj kiel la nuntempaj esperantistaj neologismemuloj, ili verŝajne estus preferintaj la latinan lingvon pro la pli granda elvoka forto de ĝiaj vortoj kaj esprimoj kaj ni nun sendube posedus nek la Rolandkanton nek la francan lingvon mem. Feliĉe la tiutempaj poetoj estis iom pli obstinaj ol la nunaj Esperantonovemuloj kaj ili uzadis la ŝajne senfortajn kaj senasociajn francajn vortojn tiom longe, ĝis ili fortiĝis kaj en iliaj zorgemaj manoj proviziĝis per varmaj asocioj kaj rememoroj.

Uzu centfoje en ĉiu tago la adjektivojn malgranda aŭ malnova kaj post unu semajno vi tute forgesos, ke ili konsistas el mal kaj granda aŭ mal kaj nova, kaj konsideros ilin same unublokaj kiel ekzemple la latinajn parvus aŭ vetus.

(Daŭrigo.)

NI LEGIS

Rezolucio pri Akademio de Esperanto. La 22-a kongreso de SAT en Parizo, konklude de propono, prezentita al ĝi en la tagordo de la debato, konstatas la fakton, ke la nuntempa pozicio de la ĵus restarigita Akademio (antaŭe Lingva Komitato kaj Akademio) en la Esperanta movado ne estas kontentiga laŭ organiza vidpunkto kaj opinias tial necesa doni al ĝi firman kaj regulan bazon. La kongreso plie konstatas malaprobe, ke plimulto de la nunaj Akademianoj miope kontraŭas la eniron de kompetentuloj el la laborista Esperanto-movado en tiun organismon, kio nepre malutilos al prestiĝo de la oficiala lingva instanco de la movado kaj endanĝerigos ĝian ĝeneralan kaj pure lingvan karakteron. (Aperigo de tiu ĉi rezolucio en la Akademia Bulteno estas atendata.)

Ni bone komprenas la sentojn, kiuj iniciatis tiun rezolucion. Ni konsilus revenon al la originala titolo, nuligon de decido pri landaj nomoj, pligrandigon de membro-nombro.

El deklaro de japanaj sciencistoj pri problemoj de la paco, farita de 59 gvidantaj sciencistoj en Japanujo kaj publikigita de UNESKO la 13-an de Julio 1948, ni represas el „La Revuo Orienta“ (Aprilo 1949) la alineon 2: „Paco ne povas esti akirata per nura konservo de la estanta stato, sed estas fiksota nur per pozitiva reformo de la aktualeco. Alivorte, paco estos en niaj manoj, nur kiam ekspluato de homoj aĝe de homoj estos abolita per radika ŝanĝo en la socia organizo kaj en la pensmaniero. La direkto kaj metodo de tia ŝanĝo kompreneble ne malmulte dependas de estontaj studoj, sed almenaŭ estas jam evidente, ke paco kaj prokrasto de tia ŝanĝo malfacile harmonias.“ — Krom la saĝa aserto ni laŭdu ankaŭ la bonan lingvaĵon de la tradukinto.

Pri la stato de la movado en Usono informas tre leginda raporto de s-o G. A. Connor al la 39-a Nord-Amerika Esperanto-Kongreso, okazinta la 1.—4. Julio en Delaware. Esperanto-Asocio de Norda Ameriko havas nun 713 membrojn. La komitato sukcesis havigi al Esperanto finarcan subtenon de grava usona fondaĵo.

Dua prezento de la opero „En la puto“ fare de la Verda stacio la 5-an de Oktobro je la 23,00—0,23 horo ankoraŭ pli vidigis bonegajn kvalitojn de la versa traduko kaj de la aktorantoj. Ni ne forgesu ankaŭ laŭdi la eminentan orkestron. Ankaŭ la akompanantaj klarigaj versoj de Pumpr, deklamitaj de Höger, denove pruvis arton de la deklamanto kaj tiun de la verstaranto. Kaj ni enskribu tie ĉi ree la kantistojn Hanzalíková, Tauberová, Votava, Kalaš. La Verda stacio prezentas nun sian artan programon ĉiun unuan merkredon de la monato je la 23,00 horo. Ne forgesu aŭskulti!

Flandraj esperantistoj, gviditaj de s-o Ach. de Maertelaere (Gent), dissendas presitan cirkuleron, en kiu ili protestas kontraŭ apartiĝemo de flandraj esperantistoj, redaktantaj gazeton Flandra Esperantisto, kiuj organizas en Belgio apartajn flandrajn kongresojn apud la belgaj. En tiuj ĉi partoprenas belgoj franclingvaj kaj belgoj flandringvaj. La kongresoj flandraj ŝajnas, laŭ aŭtoro de la cirkulero, proklami devizon „Nur inter ni“, kio ŝajnas al la aŭtoroj stranga. Ankaŭ ili polemikas kun Pik, kiu en Flandra Esperantisto mokis pri devizo „Unu belga nacio, unu belga ligo, unu belga kongreso“. Li citas difinon el la flandra enciklopedio, kiu sub titolo „nacio“ difinas jene: „Popoloj vivantaj sub unu sama ŝtata aŭtoritato: la Belga, la Svisa nacio.“

Hom-kolonio en Israel-lando estas fondata sur principoj de homa libereco, pacifismo, esperantismo, naturisma kuraĉado, vivsimpleco, vegetarismo. Interesiĝantoj turnu sin al „La Vokanto“ 16 I. Elĥanan-str., Tel Aviv, Israel, S. Zamir.

Viskadalen 1949. Nomo de tiu ĉi sveda urbo versimile eniros historion. La 27-an de Junio komenciĝis tie en la popolaltlernejo internacia esperantlingva kurso pri sveda socia strukturo kaj socia politiko. Partoprenis 23 personoj el 8 landoj, inter ili 15 ne-svedoj; ili ne venis por diskuti pri esperantistaj problemoj, sed por iom aŭdi pri svedaj cirkonstancoj en certaj rilatoj. La kurson organizis Sveda Laborista Kleriga Asocio, apogata de la sveda ŝtato. La sindikatoj per mona subteno ebligis al la nesvedaj partoprenintoj resti en la lando dum du semajnoj preskaŭ sen elspezo de mono. Ĉefaj temoj, pri kiuj oni prelegis, estis: La regado de la popolo per la popolo. Instruado kaj edukado. Kooperativa movado. Popolaj parkoj kaj kunvenejoj. Organoj de la labora merkato. Generalaj sociaj prizorgoj. Sveda gazetararo. Prizorgo de kulturaj memoraĵoj. Sveda arto, literaturo kaj muziko. La kursanoj ne nur aŭskultis la prelegojn; okazis ofte ekskursoj kaj specialaj aranĝoj. Gvidanto de la kurso estis Einar Adamson, ĉefprizorganto de la kurso estis Gunnar Rosell, pluajn dankojn meritas Ernfrid Malmgren kaj multaj aliaj esperantistoj. Ni nur bedaŭras, ke pro valutaj kaŭzoj ne estis eble ricevi permeson por iu ĉefoslovaka partopreni, kaj ke ni povas sole danki al svedaj amikoj pro ilia iniciato. Informojn pri la kurso ni ĉerpis el Svenska Esperanto-Tidningen el Aŭgusto.

La Vokanto, intelekta broŝuro, ciklostilita, unua numero 18 paĝoj kaj kovrilo, prezo por numero 3 respondkuponoj. Pluraj tre interesaj artikoloj. Adreso: 16 I. Elĥanan-str., Tel-Aviv, Israel. S. Zamir.

Sindikato de la Fervojistoj en Finnlando, membro de la Centra Asocio de Sindikatoj en Finnlando (subskribintan la petskribon al UNO por 340.000 membroj) decidis, ke Esperanto estu enkondukata en la studplanon de la sindikato kiel egalvalora fako inter aliaj studobjektoj. La decido okazis en la kunveno la 26—29-an de Majo. (Esperanta Finnlando, Julio.)

La Revuo Orienta (Tokio, Hongo-Motomati, Japanujo) aperas jam la 30-an jaron. Numero el Junio havas 32 paĝojn en la japana kaj en Esperanto. La ĉefartikolo estas „Puŝkin kaj liaj verkoj“, presita tiel, ke mallongaj esp. alineoj sekvas japanlingva klarigo de vortoj kaj gramatiko kun japana traduko.

Ministro-prezidanto pledas en Esperanto. „Esperanto-Press“ (Mühlbachstr. 47, Zürich 32, Svislando) ĵus dissendis sian unuan „UN-Bultenon“, en kiu la nederlanda ministro-prezidanto Willem Dress defendas la nederlandan tezon rilate al Indonezio. S-ro Dress skribis sian artikolon en Esperanto kaj sekve li estas ĝis nun la sola ministro-prezidanto, kiu persone lernis kaj praktike uzas la internacian lingvon. (Laŭ Heroldo de E., 1. VI.)

La Ponto. Esperanto, die Brücke zur Welt. Oficiala revuo de Germana Esperanto-Asocio. Redaktoro Dr S. Ziegler (13 b), München-Pasing, Engelbertstr. 7. — Ni ricevis numerojn 3-4 kaj 5-6 el la tria jarkolekto, tre zorge redaktitajn kaj bele presitajn (duobla numero 8 paĝoj) en la germana kaj en Esperanto. La gazeto vidigas tre viglan organizan vivon.

Esperantologio, Internacia Revuo por Lingvistiko kaj Bibliografio de Esperanto. Redaktata de d-ro Paul Neergaard, Ak. Kopenhago, Danlando (Gothersgade 158) aperigis en Aŭgusto sian unuan kajeron, 80-paĝan, kun sekvaj artikoloj: Paul Neergaard: Enkonduko, Vilho Setälä: Lingva esprimkapablo kiel funkcio de la vorttrezoro, G. Waringhien: La akuzativo en E. el teoria kaj interlingvistika vidpunkto, Dr O. Reiersol and R. C. Marble: A Comparison between Word Formation in Esperanto and English. D-ro J. Régulo Pérez: Hispanidaj neologismoj en E., D-ro P. Neergaard: Bibliografio de esperantologia literaturo 1940—1948. Universitataj katedroj de Esperanto. Setälä en sia studaĵo venis empirie al leĝo, ke deficiente en kono de la lingvo (nombro de nekomprenataj parol-elementoj) estas esponenta funkcio de la amplekso de la vorttrezoro-

ro, kiun la lernanto posedas. Ĝi estos trovo sensacia, se pluaj esploroj ĝin konfirmos. Studaĵo de Waringhien prezentas tre konvinkajn argumentojn por akuzativo por ebligado de klareco kaj fleksebleco de la stilo. La donitaj ekzemploj estas tre novaj kaj konvinkaj. En anglalingva traktato de Reiersol kaj Marble ni substreku ĝian akcenton pri derivado per -eg; tiu sufikso ne havas analogion en multaj lingvoj, sole parola lingvo norvega kaj sveda havas prefiksojn kjempe- kaj kaempe-. Régulo Pérez rekomendas inter aliaj formojn „donĥuano“, „donkiĥoto“. La bibliografio estas tre utila verko de la redaktinto. Ni aldonu, ke ankaŭ la eksteraj de la kajero estas tre plaĉa, mi dirus eĉ impona. La redaktoro kaj la eldoninto akceptu gratulon kaj dankon.

En statuto de SAT oni parolas pri pozitiva rezulto, kiun atingas la eduka, kultura agado de SAT-anoj ĉe la mem. broj mem: Tiu agado „celas malebligi ĉe la membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiun ili ricevas en siaj apartaj medioj“. (Sennaciulo, Apr. 1919.)

Poemo de Karolo Piĉ „Al via fantomo“ aperis en Norvega Esperantisto (el Marto).

Amerika Esperantisto aperas en la jaro 1949 en tre belaj broŝurformaj kajeroj, titolitaj „American Esperanto-Magazin“, redaktata de G. Alan Connor. Precipe legindaj estas ĉiam la anglalingvaj artikoloj de William Solzbacher kaj artikoloj en „Esperanto in Action“ kaj „Around the World“.

Voĉo de Islando (poŝtkesto 1081, Reykjavik, Islando), 8-paĝa kun aparta ilustrita kovrilo, tute en Esperanto, redaktata de Olafur Kristjánson kaj Arni Böðvarsson, aperas deponita la 1-a de Aprilo, kvaronjare. Tre interesa enhavo pri islandaj ekonomia situacio, literaturo, popolmoraj, turismo kaj esperantista movado enlanda. Tre saĝe redaktata. Leginte la du unuajn kajerojn mi multon sciindan eksciis pri tiu grava granda insulo.

Esperantista Komerca Ĉambro por praktika uzado de E. inter komercistoj havas naciajn perantojn en 13 landoj. Sidejo ĝia estas en Lyon (Francujo) ĉe ĝen. sekretario Richard Levin, 55, av. Félix Faure.

Anglalingva propagandilo „Esperanto, The world Interlanguage“, aperinta en Usono, meritas esti enskribita tie ĉi pro la bona teksto same kiel pro la bela tipografia aranĝo (broŝureto de 16 paĝoj 7,6×12,5 cm, en kiu la ĉapitroj koincidas kun la paĝoj). Ĝi aperis kiel 183-numero en serio de „Personal Growth Leaflets“, eldonata de The National Education Association, Washington 6, D. C.

Tirol-Aŭstrio, riĉe ilustrita prospekto, eldonita de la Landa Trafikoficejo por Tirol, Innsbruck. Senpage ricevebla.

Japanaj sciencistoj kaj Esperanto. Sciencistoj kaj teknikistoj en Japanujo klopodas enkonduki Esperanton en sian fakon. En jenaj fakaj libroj la aŭtoroj donas tradukon de terminoj en la lingvoj angla, germana kaj esperanta:

Prof. K. Inoue: Enkonduko de biologio (1947, lernolibro por kolegiaj studentoj).

Inĝ. K. Ossaka: Tekniko de vagonkonstruo. Analitiko kaj praktiko. (Vol. 1, 1948, teknologia verko por specialisto).

Prof. M. Suzuki: Enkonduko de fiziologio (1949, lernolibro por kolegiaj studentoj).

En „The Bulletin of the Chemical Society of Japan“ (bulteno de Japana Kemia Societo en fremdaj lingvoj; Dec. 1948) aperis traktato de s-ro Jukio Ota en Esperanto „Malhelpa Afiniteco de Benzadrino-Derivaĵoj al Aminooksidazo“.

„**Krucumo**“ de Karel Čapek el Libro de Apogrifoj, tradukita de Vespo, aperis en Heroldo de E. el 16. Apr.

El la Zamenhof-familio vivas nepo de la Majstro Ludoviko Zamenhof kaj bofilino de la Majstro Wanda Zamenhof. (Laŭ Heroldo de E.)

Unuatoja uzo de Esperanto en televido okazis la 15-an de Marto 1949 je la 20,30 horo en Eindhoven (Nederlandoj). Estis elsendata intervjuo de s-ino Isbrucker kun ĵur-

nalisto Sjoerd de Vrij kaj unu Csehmetoda leciono prezentata persone de s-o Andreo Cseh. Oni vidis lin ĉirkaŭitan de liaj bestoj kaj ceteraj objektoj, li parolis forte, kuraĝe kaj elegante, respondadis nevidebla aŭskultantaro. Post fino de la leciono s-ro de Vrij dankis s-on Cseh esperantlingve uzante scion ĵus akiritan pro la klara instruado, kaj Andreo Cseh, kontenta pro la rezulto, prenis la verdan stelon de sia brusto kaj fiksitis ĝin sur la jakon de nova adepto. (Laŭ Heroldo de E., 16. Apr.)

Justecon por Esperanto! vokas saĝe kaj klare Dro Ivo Lapenna en la Suda Stelo el Majo. Ofte eĉ en esperantistaj gazetoj oni parolas pri internaciaj artefaritaj lingvoj, kvazaŭ reale ekzistus pluraj tiaj lingvoj, kia estas Esperanto. Tio estas falsa prezento de la situacio, ĉar Esperanto kiel lingvo kun literaturo, kun gazetaro, kun miloj kaj dekmiloj da personoj uzantaj ĝin ĉiutage kaj skribe kaj parole estas unikaĵo. Ĉiuj ceteraj estas simple nuraj projektoj senvivaj kaj sen vivanteco. Ankaŭ pri la naciaj lingvoj oni ne devus diri, ke ili estas „naturaj“, ĉar la lingvo ne estas produkto de la naturo sed tipa produkto de la homa socio. Tio signifas, ke la aktuala karaktero de kiu ajn esplorata lingvo kaj ĝia historio estas esence ligitaj al materia vivo de tiu homgrupo, kiu estas ĝia portanto. Ekster la homa socio ne ekzistas nek povas ekzisti lingvo! Same Esperanto estas lingvo portata de la socia grupo sufiĉe klare difinebla kaj estas de ĝi kreata kaj disvolvata. Neniu el projektoj de internaciaj lingvoj povas ion similan aserti pri si.

Pola Esperantisto, organo de Asocio de Esperantistoj en Pollando (Varsovio, Maršalkowska 81 m. 32), aperis post plurmonata paŭzo en Julio 1949, 10 ciklostilitaj paĝoj indikitaj kiel n-ro 1—7. Ni salutas reaparon de kunbatalanto ĉe frata slava nacio kaj represas pri agado de la Varsovia filio: „La lasta marta membrokunveno espris dankon al 10 aktivuloj, kiuj baze de kontrakto pri laborkonkurado distingigis per sia interkonatiga laboro. Laŭ la decido de Ĉefa estraro I-a premio estis donita en formo de senpaga veturo al la Landa Esperantista Kongreso aŭ Feria Esperanto-Universitato; II-an kaj III-an premion en formo de libroj senditaj de ĉeĥoslovakaj esperantistoj Varsovia filio donacis al du ceteraj aktivuloj.“

Bulteno de banloko Karlovy Vary (Karlovarský lázeňský časopis), gazeto zorgite redaktata kaj presata sur tre bela papero, enhavas krom la ĉefaj artikoloj ĉefaj ankaŭ rubrikajn alilingvajn (rusan, polan, anglan, francan). De-

post numero 3/4 el Aprilo aliĝis al tiuj rubrikaj ankaŭ rubriko verkata en Esperanto. Redaktas ĝin MUDr Fr. Vaněk, kuracisto kaj prihigiena konsilisto de ĉs. fervojoj, en Nová Role. La artikoloj titolas: „Esperanto utile servas“.

L'okcidentano estas bulteno de SAT-anoj en Usono. La numero el Marto 1949 enhavas tradukon de Usona strikanto. (1121 N. Central Ave. Apt. 12 D. Glendale 2, California, Usono.)

Pri Amerikanoj ni citu el la artikolo „Amerikaj impresoj“ de Julia Isbrücker okaze de ŝia prelegvojaĝo tra Usono (en American Esperanto Magazine, Jan.-Feb. 1949) sekvan alineon: „Mi mire konstatis, ke ili vidas tuj la grandan utilon de Esperanto, ankaŭ por prepari pli pacan mondon. La ĝenerala penso estas, ke en Ameriko oni tute ne povas senti bezonon de internacia lingvo, sed kiam mi diris tion al iu Amerikano, li respondis: Kompreneble la Amerikanoj sentas por Esperanto, ĉar ili malsategas lerni lingvojn kaj ili vidas en Esperanto facilan ilon por transalti ĉiujn aliajn lingvojn por povi atingi la tutan mondon.“ Jen esperiga fakto! Nia tasko nun estas disvastigi Esperanton grandskale tie ĉi. Sufiĉas doni demonstracion de unu Cseh-leciono por entuziasmiĝi la publikon.

Occidental ŝanĝis sian nomon depost 1. IX. 1949 je Interlingue laŭ decido de „senato“ de la „Interlingue-Union“, kiu akceptis tiun ŝanĝon per 16 voĉoj el 18. (Laŭ ciklostilita 2-paĝa „Voce de Praha“ el Sept.)

Pri kunveno de niaj fervojistoj, poŝtistoj, tramistoj kaj telekomunikistoj dum la kongreso en Liberec raportas s-o Otčenášek en La Interligilo (Jul.-Aŭg.). En tiu numero estas aldonita listo de ĉs. poŝtmarkoj, pri kiu ni raportis sur p. 51.

En la Internacia Filatela Ekspozicio en Parizo la 1-an ĝis 12-an de Junio prezentis Internacia Filatela Esperanto-Klubo ekspozicion de Esperanto-poŝtmarkoj, oficialaj poŝtaĵoj kun Esperanto-teksto kaj koverton skribitan de Zamenhof. La klubo ricevis diplomon. (Interligilo, Julio-Aŭgusto.)

Nia stelo, se estas presata nigre, nepre devas esti prezentita haĉita de supre maldekstre malsupren dekstren; tio signifas en la „Heraldika Arto“ koloron verdan. Tiel instruas en Esperantisto Slovaka (p. 113) Martin Benka.

KRONIKO ENLANDA

Kampanjo por Petskribo al Unuigita Naciaro estas finata kun sekva rezulto (laŭ „Esperanto“ el Majo):

Germanujo	7 061 765	Usono	9 456
Japanujo	1 994 174	Argentino	7 138
Ĉeĥoslovakujo	1 201 154	Urugvajo	6 229
Nederlando	1 096 999	Portugalujo	3 740
Britujo	1 014 247	Aŭstralio	3 376
Aŭstrujo	796 489	Svislando	3 069
Norvegujo	560 021	Novzelando	2 540
Polujo	521 831	Egiptujo	2 299
Finnujo	346 390	Grekujo	2 050
Francujo	247 882	Maroko	1 336
Brazilo	244 089	Ĉinujo	539
Svedujo	175 991	Palestino	538
Italujo	75 589	Kanado	487
Belgujo	65 306	Ĉilio	485
Hungarujo	61 504	Irlando	477
Islando	28 349	Hindujo	409
Bulgarujo	21 992	Sudafriko	310
Jugoslavujo	17 477	Hispanujo	276
Danujo	11 267	Ceteraj lokoj	795
	sumo		15 588 062

Trian lokon en la listo ni dankas al kolektiva subskribo de la Sokol-Asocio (unu miliono), kiun akiris s-o T. Kilian. Krome li kontribuis per 5675 individuaj subskriboj kaj per kolektiva subskribo de Skolta regiono en Třebíč (2100). Alia grava kolektiva subskribo estas tiu de Matica Slovenská (79 875), same pro la nombro kiom pro signifo de la institucio mem.

Analizon de la rezultoj ni prezentos pli poste kiam

UEA publikigos pli detalajn tabelojn. Hodiaŭ akceptu ĉiuj samideanoj, kiuj laboris en tiu ĉi tasko, niajn sincerajn dankojn.

Ekzamena komisiono kunsidis la 3-an de Septembro en Praha en la Asocia oficejo por ekzameni 7 kandidatojn pri kapableco instrui Esperanton en lernejoj kaj kursoj. La ekzamena senato konsistis el Dr St. Kamarýt, prez., Dolfa Bartošik, Rud. Hromada, Dr T. Pumpr. Ĉiuj kandidatoj sukcesis kaj ricevis diplomojn (en krampoj estas temo de la hejma tasko):

Jan Blažek, tekn. oficisto en Strakonice (Ĉefaj temoj de artikoloj en lastaj numeroj de Heroldo de E.).

Ant. Lauterbach, faka instruisto en Chlumeč n. C. (Signifo de la kvinjara plano).

Frant. Mašek, instruisto de la religio en Most (Estiĝo de la Ĉeĥoslovaka Eklezio).

Jiří Pastor, studento en Litvínov (Ekonomio en sistemo feŭdalisma kaj liberalisma).

Václav Růžička, fervojisto en Podmokly (Fervojo kiel kulturfaktoro).

Frant. Ryba, direktoro de mezlernejo en Chlumeč n. C. (Ĉu Esperanto povas helpi en batalo por paco?)

Valda Vinař, komercisto en Týniště n. O. (La ĉeĥa ĵurnalismo).

Estis donitaj notoj 2 eminente, 2 tre bone, 3 bone kapabla. La ekzamenitoj ricevu gratulon kaj dankon pro sia sinediĉo al lingvaj studoj.

Urbo Olomouc eldonis elegantan albumon (10×15 cm) kun 64 bildoj, urboplaneto kaj konciza historio de la urbo. Klarigoj sur la bildoj kaj la teksto estas en la ĉeĥa,

rusa, angla, franca kaj Esperanto. La fremdlandaj tekstoj estas presitaj kiel aldonaĵoj al la libreto. Prezo 30 Kĉs. — Ankaŭ estis eldonita detala plano de la interna urbo (51×94 cm) kun klarigoj en la ĉeĥa, rusa, pola, angla, franca kaj Esperanto. Ĝi kostas 35 Kĉs. Ambaŭ eldonaĵojn povas liveri Esperantista Societo en Olomouc kaj ni rekomendas mendi ilin, precipe la albumon, kiu tre taŭgas por esti sendita al fremdlanda amiko.

Regiona Komitato de la 4-a regiono (Karlovy Vary) kunvenis la 18-an de Septembro en Loket. Estis decidite, ke la kluboj en Cheb kaj Karlovy Vary akceptu patroncon pri rondetoj kaj grupoj ĵus fonditaj aŭ fondataj en la regiono. En la lokojn, kie estas aranĝata kurso unuan fojon, sendos la Regiona Komitato parolanton, kiu prelegos pri problemoj de interlingvo antaŭ la kurso. Supera E-kurso en Karlovy Vary estos aranĝata ankaŭ en la jaro 1950 kaj oni esploros eblecon de pli vasta aranĝo laŭ eblecoj de loĝigo. Oni rekomendas al kluboj fondi laŭ modelo de la Klubo en Cheb ŝparfondaĵojn, ebligantajn partoprenon en diversaj dumsomeraj kursaroj en la respubliko.

Agrabla surprizo. Vojaĝante antaŭ nelonge per rapida motortrajno „Pernikář“ (traduko: „Marcipanulo“, nomita laŭ tio, ke ĝi ĉefe tuŝas la urbon Pardubice, kiu estas fama pro fabrikado de tre bongusta marcipano), mi estis tre ĝojige surprizita per afiŝeto, kiu — kaŝita sub vitro — legiĝas vojaĝantojn ĉeĥan surskribon: „Esperanto konatigos vin kun la tuta mondo.“ Por tiu ĉi surprizo certe ni danku al niaj agemaj samideanoj en Hradec Králové. (-eto)

Fervojdirekcio en Olomouc jam la trian fojon invitas fervojistojn de sia regiono al Esperanto-kursoj, kiuj okazos laŭ la oficiala cirkulero en ĉiuj stacioj, kie aliĝos sufiĉa nombro de interesantoj.

Esperanto-elsendoj de Ĉeĥoslovakio

dum la vintra sezono 1949—1950. Nova listo, valida de la 2-a Oktobro 1949. (Atentu la ŝanĝojn!)

Ĉiutage:

I. 15.45—16.00 h MET, 31.41 m (9550 kc), kaj 1535 m (14.45—15.00 h GMT).

II. 22.00—22.15 h MET, 49.92 m (6010 kc) (21.00—21.15 h GMT).

Lundon:

22.45—23.00 h MET, 470 m (Praha I), 325 m (Brno I), 259 m (Ostrava) — (21.45—22.00 h GMT).

Merkredon:

Kiel lundon. (La mezonda progr. plilarĝigita je 5 min.)

Unua merkredo en ĉiu monato: VERDA STACIO: 23.00—23.30 (24.00) MET, 269 m (Praha II), 325 m, 259 m, 219 m — (22.00—22.30 aŭ ĝis 23.00 h GMT).

Inaŭguro 5. X. per ripeto de l'opero de V. Blodek: „En la puto“.

Ostrava ne elsandas memstare en Esperanto.

La kondiĉo „sine qua non“ por la plua daŭro de la elsendoj estas, ke la aŭskultantoj sendu de tempo al tempo al la stacio sian aŭskultraporton. Ĉu vi deziras, ke la elsendoj ne estu limigataj? Do ĉiu plenumu samideanan devon. Skribu al: Ĉeĥoslovaka Radio, Esperanto-Sekcio, Praha XII, Stalinova 12.

Skribaĵojn, rilatantajn al la „verdstacia“ programo, adresu al: Verda stacio, Praha XII, Stalinova 12. jm

LERNU ESPERANTON

de Daniel Quarello

Libro-serio por niaj verkistoj,
tradukistoj kaj literaturamantoj.

I. LERNU ESPERANTON

II. KOMPLEMENTOJ DE L'SUBSTANTIVO

Prezo afrankite de ĉiu broŝuro 15 Kĉs

Mendu ĉe nia Librovendejo

La unua volumo estas disvendita, el la dua restas sole nemultaj ekzempleroj.

Renkontiĝo de ĉeĥaj kaj polaj esperantistoj sur monto Ĉantoryja ĉe Třinec sur la landlimo, organizita de Esperantista Laborkomitato en Ostrava, okazis la 26-an de Junio. Venis 200 ĉeĥoj kaj 20 poloj.

Entreprema Labor-lernejo ROH (ĉe la Revolucia Sindikata Movado) en ĈZKG, Gottwaldov I, havas en sia lingva fako en listo de instruataj lingvoj ankaŭ la nian en jena sekvo: „la rusa, angla, hispana, Esperanto, slavaj lingvoj“. Ankaŭ la alia entrepreno de ROH „Instituto de modernaj lingvoj“ havas en siaj prospektoj Esperanton inter la instruataj lingvoj. La kultura fako de nia sindikata movado akceptu pro tiu ĉi progresema sinteno niajn laŭdajn dankojn.

Dua regiona kunveno en Nové Mesto nad Váhom la 18-an de Septembro kunvenigis ĉirkaŭ 40 partoprenantojn el distriktoj Bratislava, Nové Mesto n. V., Nové Zámky, Trenčín, Trnava kaj Turč. Sv. Martin. Kiel gastoj ĉeestis 7 samideanoj el Veselí n. M. kaj s-o Svačina el Lanžhot. La laborkunveno en hotelo Kollár akceptis proponon de moraviaj samideanoj, ke ĉiujare okazu amika regiona kunveno de slovakaj samideanoj el Slovakujo kaj el Moravia Slovakio alterne unu jaron en Slovakujo, duan jaron en Moravio. Post la tagmanĝo veturis la partoprenantoj al la vilaĝo Višnové kaj el tie ili ekskursis al ruinoj de kastelo Čachtice. (Pavlacký)

En regiono Altaj Tatroj gvidas dum aŭtuno laŭ invito de regiona gvidanto Dr E. Sahliger kursojn s-o Karlo Šolc el Mladá Boleslav. Krom kursoj en gimnazio, meza lernejo kaj publika kurso en Kežmarok li gvidas en tiu ĉi urbo ankoraŭ apartan kurson por ĝeinstruistoj el la urbo kaj ĉirkaŭaĵo. Estas preparata fondo de slovaka filio de la Somera Doksy-Kolegio, versimile en Svit. (Laŭ E. S.)

ESPERANTISTA VIVO

Mortis Stanislav Otruba, lernejestro e. p. en Těšetice u Olomouce, la 21-an de Majo 1949. Sur p. 72 de nia pasinta jarkolekto ni rememorigis lian 80-an naskiĝtagon. De lia korespondanto kaj amiko dum 40 jaroj B. E. Long ricevis la samideanoj en Olomouc esprimon de kondolenco, kiun ni represos en ĉeĥa traduko. Ankaŭ kun Kabe li amikiĝis (dum kongreso en Krakovo en 1912) kaj posedis liajn dediĉvortojn en „Pola Antologio“. Li estis unu el la plej fidelaj samideanoj, ni memoru lin!

Mortis Josef Šidlo en Praha, eldoninto de la laborista esperantista gazeto „La Kulturo“, kiu aperadis en 1912 ĝis 1914 kaj tiam tre bone influis la laboristan medion. Li mortis la 29. VIII. 1949 en aĝo de 70 jaroj kaj meritas daŭran rememoron pro farita laboro.

Mortis Frant. Dejmek, 82-jara, la 9-an de Oktobro, en Votice. Multaj samideanoj en Praha certe ne forgesis tiun fidelan, modestan, persistan laboranton. En j. de la Kongreso en Praha li aperigis ekonomian mapon de la Respubliko, kiun li mem desegnis kaj kompilis. Li estis oficisto de Financa Direkcio en Praha. La familio akceptu esprimon de nia profunda kondolenco.

LITERATURA MONDO

Reprezenta revuo de nia literaturo. Kunlaboras ĉiuj gravaj Esperanto-verkistoj. — Abonon Kĉs 150.— por 1949 paĝu al Librovendejo de EAĈSR.

Nova propaganda afiŝo multkolora

21 × 29 cm, eldonita de la Esperantista klubo en Brno, havebla ĉe nia Librovendejo.

Prezo Kĉs 3.— krom afranko.

Mendu kaj disvastigu tiun belan afiŝon!

Také occidentalisté

chtějí, aby byl zaveden pomocný mezinárodní jazyk. Bohužel svoji akci v posledních měsících řešení problému zase poškodili. Rozesílají různým veřejným korporacím, hlavně okresním osvětovým radám, ale také na př. České akademii, letáky, v nichž je vyzývají, aby hlasovaly pro occidental (jemuž dávají někdy krycí jména interlingve nebo ilo) proti esperantu a snaží se vzbudit zdání, že occidental je srozumitelný na prvý pohled, kdežto esperanto ne.

Pochybujeme, že některá z těchto vážných korporací odhodlá se zaujímat stanovisko. Mnozí z jejich funkcionářů jsou velmi dobře informováni a dovedou pochopit škodlivost frakcí a separatismu pro každou kulturní organizaci. K použití našim spolupracovníkům uveřejňujeme přehled kritik occidentalu, jak je sestavil W. E. Collinson PhD, profesor germanistiky na universitě v Liverpoolu (v překladu K. B. Heinricha):

Čím více se dívám na occidental, tím pošetilejší se mi zdají jeho hlasitě vytrubované nároky. Jménem mezinárodnosti připouští nepravdivost a zrůdnosti, které jej činí úplně nevhodným pro nelingvisty, zejména pro nerománské, a k tomu při svých zmezinárodnujících snahách ustavičně připouští „logicky odvozené“ tvary, jaké jsou v jiných umělých jazycích, kde však jsou zceleny v dobře pojatou a logicky hájitelnou soustavu. V occidentalu nelingvista je odpuzován přemírou národních zmatenín a lingvista je odpuzován nedostatkem poučení, kdy úplně mezinárodní slovo je přípustné a kdy nikoliv.

I. O hláskách a jejich výslovnosti (fonologie):

1. Podržení zvuků ö (oe) a ü (y) psané eu a y znesnadňuje mnohým, zejména Angličanům, aby si je osvojili a správně je vyslovovali.

2. Existence koncových d, g, b, na př. ad, flag, tub, které mnohého, zejména německy mluvícího, svádějí k nepřesné výslovnosti (d — t, g — k, b — p), vyžaduje nutně zvláštního upozornění.

3. Nedostatek nějaké jasně vymezené, všeobecně použitelné zásady o přízvuku. Pravidlo o přízvuku na samohláse před poslední souhláskou slova je stanoveno se zvláštní výjimkou koncovky množného čísla -s, příslovcové koncovky -men a čtyř přípon (-bil, -ie, -in, -ul). Dokonce nedostí na této složitosti, hodné slov, která porušují pravidla o přízvuku, musí se označovati zvláštním znaménkem přízvukovým (akcentem).

Namítne se nepochybně, že tato ohebnost je odůvodněna touhou po přizpůsobení se mezinárodní výslovnosti. Je-li tomu tak, smíme se zajisté tázati na pravidlo k slovům **incredibil, visibil, astronomie**; neboť jejich výslovnost podle hořejšího pravidla neodpovídá původnímu přízvukování anglickému.

II. O pravopise a hláskování (ortografie):

1. Rozlišování několika zvuků označených touž písmenou je břemenem a obtíží pro velmi mnohé. Nejhorší potíží jsou c (vysloveno c před e, i, y a k před a, o, u); g (vysloveno ž a g obdobně); s (vysloveno s na počátku, z ve středu slova); a ch mající kolísavou výslovnost č, š, k jako angl. ch ve slovech **church, machine a loch**.

2. Směšnou složitostí jest užívání zdvojených hlásek, obzvláště hodné odsouzení ve slovech, kde není ani v jazyce původním, na př. **mudde**. Špatné příklady jsou **carre, canne, foliettar** (oproti původnímu **feuilleter**), **mann** (to je jen v němčině, ale není v angličtině ani v holandštině). Patentovaná nesmyslnost v tom směru trká i samotné occidentalisty, jimž se říká, že smějí, dávají-li tomu sami přednost, psáti na př. **colisión, raport** místo **collision, raport**, a tak drtí svoji vlastní zásadu mezinárodnosti.

III. O mluvnici (gramatika):

1. Zavedení neurčitěho členu **un** bude působiti značné nesnáze většině mluvících slovansky a finsky a vyžádá si zvláštní soubor pravidel (ne tak dalece upravených) pro jeho skladebné užívání.

2. Použití zvláštních kmenů pro **já a mne** (totiž **yo a me**), **my a nás**, **vy a vás** atd. působí značně zbytečné obtěžování paměti.

3. Rozličnost koncovek neurč. způsobu (**amar, venir, presser**) máte stejně jako nepravdivost přičestí přítomného (**amant, venient, pressent**).

4. Soustava časování není důkladně promyšlena, neboť:

a) stejného tvaru užívá se pro minulý čas skonaly a zároveň přičestí minulé činné i trpné;

b) bezkoncovkový tvar slovesa (**ama, veni, presse**) označuje přítomný čas způsobu oznamovacího i podmiňovacího, při tom však

c) zádací způsob (zdvořilostní imperativ) tvoří se slovcem **ples** s neurčitým způsobem na -r;

d) ježto pak bezkoncovkového tvaru se užívá jako podmiňovacího způsobu času přítomného, smíme se jistě ptáti, jaká je zvláštní úloha (funkce) rozšířeného způsobu zvaného „přací způsob“ (optativ): **yo mey amar**.

IV. O tvorbě slov:

1. Tu na jedné straně je pozoruhodný nedostatek přesnosti, na druhé straně přehnané a zmatené (protože nedůsledné a nejednotné) užívání jistých přípon, o nichž následuje malá ukázka:

a) Nedostatek přesného vymezení: **-a** může označovati bytost pohlaví ženského, ale také nemusí; **-ment, -age**, obě tyto přípony značí nejen srostitou činnost (konkretní akci), ale i její výsledky nebo prostředky k jich dosažení (**-age** při sčítání, označení času a místa činnosti a dokonce platu za to).

b) Mnohost odvozovacích přípon pro vyjádření v podstatě téže logické funkce, na př. odtazitá vlastnost v pojmech **přátelství, lidumilnost, délka, velikost** (**friendship, humanity, length, greatness**) je v occidentalu vyjádřena pořadem koncovkami: **-is, -tā, -ore a -ess**; je to ojedinelé nemezinárodní rozlišování ve spojení s týmž kmenem (**altess, altore, altitā**).

2. Některé příponové funkce koncovkové rozlišené jsou také foneticky těžko lišitelné, na př. **vitrerie, vitreria; homanità, homanité; cannonada, colonnade**.

3. Kde četné příponové odvozeniny se podobají úplně mezinárodním slovům, je učící se často bezradný v těchto dvou bodech:

a) neví, zda je oprávněn použití mezinárodního tvaru jako **development**, za který occidentalisté užívají často **developtation**;

b) neví, do jaké míry bezpečné lze použití některé z velikého počtu přípon, jichž smysl (funkce) je příliš volný, neurčitý nebo příliš rozsáhlý.

ESPERANTISTA POŠKALENDARO 1950

Klubo en Hradec Králové ree eldonos por jaro 1950 sian poškalendaron en kompletigita kaj plibonigita arango. Certigu al vi liveron per antaŭa mendo ĉe Esperantista Klubo Hradec Králové II, Zamenhova 1010. Eldonkvanto estas limigita, pro tio mendu baldaŭ, pli bone hodiaŭ ol morgaŭ!

INTERNACIA KULTURO

Granda revuo riĉe ilustrita. Aperas monate. Abono Kĉs 100,— jare. Pagu al nia Librovendejo.

Esperantologio

Internacia revuo por la lingvistiko kaj bibliografio en Esperanto. — Unua volumo 80-paĝa aperis kaj ricevos ĝin ĉiuj interesuloj, kiuj pagis la abonon de 250 Kĉs. — Ni akceptos ankoraŭ kelkajn abonojn.